# BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA numeroj 2-3 aprilo-oktobro 1974

ESPERANTO EN LA SERVO AL LA PACO

Estas konate, ke ĉe konsciaj esperantistoj la aktivado en la Esperanto-movado koincidas kun tiu en la movado porpaca. La vortoj "La paco estas afero de ni ĉiuj" jam ne plu estas nura slogano, ili transformiĝas en senteblan realecon, en veron, kiu konkeras la korojn kaj la mensojn de la homoj kun bona volo.

La analizo de la nuna stato de la tutmonda pacmovado montras ĝian kreskon. Ĝin partoprenas ne nur ĉiuj landoj, kiuj ĝis antaŭ nelonge suferis sub la ŝarĝo de la koloniismo, sed en ĝin eniris politikaj fortoj kaj kune batalas kontraŭ la milito kaj la imperiismo.

Dum la pasinta periodo estis farita utila kaj meritplena laboro, kiu donis renomon al nia esperantista pacmovado, sed estas ankoraŭ gravaj mankoj! En la venonta periodo ni devas akiri pli konkretajn ligojn kun aliaj pacorganizoj esperantistaj kaj neesperantistaj, trovi novajn perantojn, krei novajn sekciojn, funkciigi la komisionojn, do; labori pli aktive kaj pli konkrete por la mondpaco kaj feliĉo de la tuta homaro.

Ni ĉiuj scias, ke Mondpaca Esperantista Movado (MEM) delonge, jam depost sia fondiĝo, laboras por la paco. Sed tio ne sufiĉas: ĉiuj unuopuloj estas respondecaj pri la paco - ili devas uzi ĉiun sian forton kaj bonan volon por krei pacon, ĉiu en sia posteno samkiel en siaj hejmoj, laborrondoj, inter siaj konatoj. Do, ne nur manifesti kaj proklami, sed per instrua kaj informa laboro malkaŝi la verajn celojn de la militinstigantoj kaj agresantoj - - de la imperiismaj kaj militismaj aspiroj, montrante samtempe la vojon al pli feliĉa, pli homa vivo! Jen, la misio de la Esperantista Pacmovado kaj de ĉiu homo konscia, sentanta veran homecon, tiom alstrebitan de L.L.Zamenhof!

(Fragmentoj el kluba prelego de s-ino
M. Josková)

Z á p i s
z výborové schůze konané dne 22.4.1974

Přítomní členové výboru zvolení téhož dne na výroční schůzi.
Předseda: arch. J. Drlík

Arch. Drlík oznamuje, ze právě skončila řádná výroční členská schůze. Do výboru byli zvoleni tito členové:

Bárochová Anna
Bartošík Adolf
arch. Drlík Josef
prof. dr. Horský Rudolf
Juřenová Miroslava
Kynčl Ladislav
Lorenz Václav
Mařík Jaroslav
dr. Nývlt Miloš
Šádková Olga
Vlasák Jan
Welterová Františka
Zmeškal Alois
Josková Milada

Po krátké diskusi byly jednotlivé funkce na návrh dr.Horského rozděleny takto:

| | | |
|---|---|---|
| Předseda: | architekt J. Drlík | |
| | 1. místopředseda | dr. M. Nývlt |
| | 2. " | J. Mařík |
| | 3. " | A. Bartošík |
| pokladní . . . . . . . . . . . . . .. . . . . . . . . . . | | A.Bárochová |
| referent MEM . . . . . . . . . . . . . . .. . . . . . . | | Dr.R.Horský |
| kulturní referent . . . . . . . . . . . . . .. . . . . . | | L. Kynčl |
| hospodář . . . . . . . . . . . . .. . . . . . . . . . . . | | M. Juřenová |
| knihovník. . . . . . . . . . . . . .. . . . . . . . . . . . | | A.Zmeškal, zástupce s. Švehlová |
| vedoucí referenti mládeže. . . . . . . . . . . . | | Olga Šádková, Jan Vlasák |
| Jednatelka a zapisovatelka. . . . . . . . . . . . | | Welterová Františka |
| Redaktoři. . . . . . . . . . . . . .. . . . . . . . . . . . | | dr. M. Nývlt, J. Mařík, V. Lorenz |
| Revisoři. . . . . . . . . . . . .. . . . . . . . . . . . | | s. Hošek, s. Šperling |

Odstupujícímu výboru bylo výroční schůzí uděleno absolutorium. Nově zvolený výbor zahají ihned činnost.
Výbor se usnesl, že se bude scházet každé první pondělí v měsíci v 18 hod, před klubovní schůzí v místnosti Klubu v restauraci U BUMBRLÍČKA, Vodičkova ul. 6.

v Praze dne 22. dubna 1974.

## Praganoj en Opava

Relative multaj esperantistoj el Praha ĉeestis la III-an Esperantistan Kulturan Festivalon en Opava (5.-8.VII.1974). Ni vidis tie Drlík, Jermář, Kníchal, Králová, Kvasničková, Mařík, Sviták, Tomčík kaj Vrkoslav.

Raporton pri la sukcesinta Festivalo ĉiu jam povis legi en "Starto". Mi ĉi tie elpiku kelkajn ideojn el la parolado de k-ino Jiřina Gabrielová, reprezentanta tie, dum kvar tagoj, la ministerion de kulturo. Ideoj, kiujn la subskribinto sufiĉis noti al si:

...La Partio nun akcentas la gravecon de eksterlerneja klerigado, en kies kadro la Esperanto-movado havas sian specifan lokon... Al la libera tempo de la homoj oni devas doni krean karakteron. La hobioj estas fonto de ĝojo kaj de vivoenergio... Kiel engaĝi esperantistojn en publikan agadon? Kelkaj ekzemploj partopreni en la protektado al la vivomedio; kunfesti iujn el la jubileoj en 1975: ekz. de pentristo Slavíček, de Matěj Kopecký, de poeto J. Wolker, 75 jarojn de Vítězslav Nezval, 100-a naskiĝdatrevenon de la Nacia Artisto S.K.Neumann (cetere kunfondinto de la EK en Praha - rim. de subskrib.); cerbumi pri konkreta integriĝo de la Esperanto-asocioj en la landoj de la Konsilantaro de Ekonomie Interhelpo. - La ministerio de kulturo ebligos uzon de sia eksperimenta establaĵo pro aŭdo-vida klerigo, se montriĝos bezono, pur kurs-instruado al esperantistaj lektoroj. La fina ideo de la simpatia parolantino estis la bondeziro:

"Multe kaj multe da sukcesoj al via laboro."

/ Notis: J.Mařík/

Petr Bezruč : RUĜA PLORO /trad. Rudolf Hromada/

Flava florpoto sur griza fenestro
kruda kaj dorna jen kakto malgaja.
Iun matenon
kreskis el tigo sangruĝa kaliko
de ruĝa flor'.

Vivis poeto kun ŝato alia,
amis li rozon belegan, odoran.
Lia distiko
laŭdis la rozon, sed juĝis
severe pri ruĝa flor'.

Estas animoj en vivo solecaj,
dornoj kaj pikoj abundis por ili.
Koro ilia ?
Se ili floris, do foje kaj nokte,
per ruĝa flor'.

-o-o-o-

Důležité upozornění!

Jako každoročne byly vydány i letos SLOSOVATELNÉ POUKÁZKY Českého esperantského svazu. Všichni víme, že tento způsob prodeje esperantských materiálů má sloužit k vytvoření určité finanční rezervy a jistoty pro vydání dalších zajímavostí a potřeb pro váš styk se zahraníčím i pro vlastní potřebu.

Letošní výhry jsou o 50% vyšší než tomu bylo kdykoliv předtím, nehledě k tomu, že si můžete v plné hodnotě vyměnit poukázku za esp. zboží, které má svaz na skladě, t.j. za celých 10,- Kčs. Poukázky si můžete objednat též u našeho klubu nejpozději do 10.12.1974.

## El nia kluba vivo

Nia kluba vivo estas karakterizata en la lastaj jaroj de nestabileco de nia kluba kunvenejo. Ni rerigardu la forpasintan jaron, ekde somero 1973.

Post la dumonata ĉiulunda kunvenado en la kafejo "Praha" (Václavské nám., someron 1973) ni devis transiri en septembro en la restoracion Černý pivovar (Karlovo náměstí), kie ni eltenis ĝis la 19-a de marto 1974. Nia kasistino pagis tie por unu uzo de aparta ĉambro ja nur 60 Kčs, sed, kompense, la personaro iam ajn, sen avizo, okupis nian kunvenejon por alia societo. Tiel okazis, ke el la ĉiumardaj 21 kunvenoj en Č. pivovar sole 11 okazis kun programo, en aparta ĉambro, dum 10 el ili ne povis okazi pro okupiteco de la kunvenejo. La klubanoj, kiuj ne tuj revenis hejmen, sidis dum tiuj vesperoj inter neklubanoj en apuda bruoriĉa restoracia salono. Tiu stato, kompreneble, naŭzis nin, kaj de la 35-a marto 1974 ni sukcesis regule kunvenadi en kontentiga aparta ejo de la dieta restoracio "U Bumbrlíčka" (Vodičkova 6), sed devinte reŝanĝi la kunventagon al lundoj. Tie ni pagis 80 Kčs por ĉiu vespero. Sed ĉar tiu restoracio ne funkcias dum la vesperoj en julio kaj aŭgusto, la klubkunvenoj translokiĝis en la restoracion "U Šumavy" (Štěpánská 3), kie ni devis reveni al la ĉiumarda kunvenado. Eltenebla ejo, kiu, kvankam iom ĝenata de trapasantoj, kostis al nia kluba kaso 130 Kčs ĉiusemajne.

Ĉar la ejo "U Bumbrlíčka" estis reokupebla nur la 23-an de septembro, niaj kunvenoj, espereble jam ne ĝenataj ĝis la venontjara junio, povas denove okazi "U Bumbrlíčka" ĉiun <u>lundon</u>, la solan tagon, en kiu la ejo ankoraŭ estas libera.

Mi prilaboris la lastan kluban subskribo-libron, komencitan la 19-an de februaro 1974, kie estas ankaŭ notataj la okazintaj programoj. Sole la 26-an de febr. ni aŭdis planitan

programon, ĝardenfakan prelegon de Kynčl "Printempaj variaĵoj". En la ceteraj kvar kunvenoj en "Černý pivovar" estis prezentita, pro la supre cititaj kaŭzoj, neniu programo. De 19.2. ĝis 19.3. kunvenis tie 122 klubanoj kaj unu gasto (japano). "U Bumbrlíčka" ĉeestis en kunvenoj inter 23.3. kaj 24.6. sume 401 klubanoj kaj kromě 30 gastoj, inter ili 14 eksterlandanoj (Japanio, Jugoslavio, Pollando, Svedlando, GDR, Hungario), "U Šumavy" kunvenis en la 10 kunvenoj, ĝis 3.9., 259 klubanoj plus 46 gastoj (ĈSSR, Jugoslavio, Finnlando, Kuvajto, Hungario, Rumanio, Svedlando, Bulgario, GDR, Anglio, Meksikio, Sovetunio, Kanariaj insuloj).

En la tuta jarparto, 19.2, - 3.9.1974, la sumoj estas: 28 kunvenoj (15.4., je la Paska lundo, ne okazis), 822 klubanoj, 82 gastoj el ĈSSR kaj 14 fremdaj landoj. Meznombra klubana ĉeesto: 29 en 1 kunveno. La klubana ĉeesto estas do relative malalta, se ni ĝin komparas kun la ĉeesto de 60 - 80 klubanoj, antaŭ kelkaj jaroj, en la agrabla kaj regula kunvenejo en ZK en Řeznická strato.

Ekzistas, laŭŝajne, du realaj kaŭzoj de tiu ĉi stato

1/ daŭra manko de konvena kaj slabila kunvenejo,

2/ formortado kaj alispeca malaperado, pro maljuniĝo, malsanoj k.s. de aktivuloj, kiuj ofereme pretus plu "tiri la kluban ĉaron", dum plimultiĝas (ho ve, ankaŭ inter la gejunuloj!) tiuj, kiuj ŝatas nur "kunveturi" komforteme kaj senpene.

Ni rigandu almenaŭ unuokule la kluban kronikon de la kunvenoj ekde "U Bumbrlíčka". Krom kutimaj informserioj (en kiuj plej multe kontribuis D. Bartošík), alparoloj kaj rakontadoj de gastoj, 1.4. de d-ro R.Horský prezentis rimarkindan kontribuaĵon "La internacia lingvo - rimedo al la internacia paca kunlaboro" (pri ĝi jam informis "Esperantisto slovaka"), 8.4. A.Hejnová konigis al ni la etikon de la bonfarinto D-ro Albert Schweitzer kaj arĥ. J.Drlík informis pri la kunveno de la E-Asocioj de socialismaj landoj en Sofio. La jarkunvenon 22.4. (preparitan de komitata kunveno l.4.) partoprenis 40 klubanoj; enkondukis ĝin D. Bartošík, salutis gastoj el Japanujo, Jugoslavio, Pollando, gvidis ĝin arĥ.Drlík. Raporton pri ĝenerala aktiveco kluba kaj ideologi-politikan diskurson prezentis la vicprezidanto D-ro R.Horský, dum resumon pri la kluba unujara agado donis al ni D.Bartošík. Post diskuto okazis elektoj kaj la unua kunveno de la nova komitato dividis funkciojn (v.p.2).

Inter aliaj klubprogramoj ni menciu lumbildparoladon pri vojaĝo tra Israelo de A.Ahlrén, (6.5.), 13.5. La vivo kaj verko de J. A. Komenský (D-ro Horský), 20.5. pri la Unua UK 1905 (J. Tomčík), 27.5. feston honore al la 80 jaroj de nia senlaca kasistino Anna Bárochová (programo kreita de 8 klubanoj), 3.6. parolis M. Juřenová marĝene de la Internacia tago de infanoj, 10.6. s-ino E. Szász el Budapeŝto verve deklamis poemojn de J. Baghy kaj la stockholma klubestro G. Gerdman informis pri agado de sia klubo. 17.6. alparolis nin R.W.Rutkowski, membro de la ĉefa estraro de Pola. E-Asocio kaj E. Urbanová informis pri sia kontakto al la ČS. televizio, kiu filmis ŝian laboron kun membroj de ŝia lerneja esp. rondeto. 24.6. legis al ni D. Bartošík el parolado de W. Auld la 50-a japana japana E-kongreso (ne la angla estos la internacia lingvo!, argumentis tiu brito), dum el la buŝo de J. Mařík ni aŭdis, kiel svedo aŭskultis en GDR elsendon el Pollando pri nia A.Bárochová, 2.7. d-ro Sidki Hamdi, universitata profesoro, rakontis al ni pri sia agad-lando Kuvajto kaj s-ino Artikari rakontis pri sia patrujo, Finnlando, 2.7. en varia programo ni aŭdis de Eva Seemanová, membrino de la ensemblo de "Poezia kafejo Viola", kiel sonas versoj de Fr. Šrámek kaj de A.Sova en la Internacia lingvo, J. Tomčík konigis al ni interesan enhavon de letero de japana kompani-direktoro, kaj pluraj klubanoj partoprenis diskuton kun inĝ. J. Novák, ĉeĥoslovaka fakulo pri karateo, pri lia laborado super esperantlingva versio de lia "Sindefendo", precipe pri kreado de faka terminaro. 9.7. D.Kun (Hung.) informis pri la hungara esp.kongreso en Szeged, A.Bárochová konigis al ni la enhavon de "Informace č.20" de ĈEA, kaj Mařík rakontis pri la 3-a esp. kulturfestivalo en Opava, kiun ĉeestis (almenaŭ) 9 klubanoj. 16.7. s-ro Sirbu informis pri la stato de E. en Rumanio, dum Kynčl raportis pri la 5-a kongreso de AESSR en Martin kaj Bartošík memorigis la 140-an naskiĝdatrevenon de nia poeto Jan Neruda. 23.7. L.Kyncl legis du rakontojn de M. Twain, kaj J.Vlasák informis pri sia sondado ĉe ZV ROH-NVP rilate kunlaboron kun nia EK. (Komitata kunveno 30.7. komisiis al arĥ. Drlík kaj d-ro Nývlt daŭrigi). 6.8. d-ro VI. Zázvorka (direktoro de la Nacia Muzeo) elvokis diskuton pri la elekto de nova prezidanto de UEA, 20.8. Alex.Melnikov (Rostov-Don), veninta el SET Lančov vigle kaj detale informis pri la

esp.aranĝoj en USSR, precipe junularaj, kion sekvis tre vigla diskuto. L.Trujillo-Cásaňas (Kanariaj insuloj) informis pri la TEJO-kongreso 1974 en Münster kaj pri la E-movado en sia insula hejmlando, kaj ing. F. Sviták reliefigis al ni, laŭ propra sperto, la 59-an UK en Hamburgo, kiun ĉeestis ĉ. 1700 personoj kaj salutis i.a. 18 registaraj reprezentantoj.

La 3-an de sept. D.Bartošík rememoris la 5-an (jam!) datrevenon de la morto de nia karnemora honora prezidanto s-ro Jaroslav Šustr, kaj O. Kníchal, prez. de la ĉs. MEM-sekcio, emfazis la signifon de la Slovaka Nacia Revolucio, kies 30-a datreveno estis rememorigata en la tuta lando kaj legis el libro de Gustáv Husák. Mařík informis pri la preparata renkontiĝo en Mělník, kion skribas "Průboj" pri M.Smyčka kaj kiel neesperantistino faris unu el la plej bonaj informaj servoj pri Esperanto en "Zemědělské noviny" (21.8.). Bartošík resumis "Informace ČES č. 22".

S-ano D.Bartošík, laŭ konsilo de sia kuracisto, rezignis pri sia funkcio de prikultura referento kluba kaj enkondukanto de programeroj dum la kunvenoj, plenuminte tiun funkcion, se mi bone memoras, dum 12 jaroj, je kontento de ĉiuj membroj. Tiun funkcion transprenis de li kaj plenumis dum la lastaj monatoj lia anstataŭanto L.Kynčl.

Jen, resume, nia enkluba vivo dum netutaj sep monatoj. Juĝu mem, ĉu ĝi estis pozitiva. Konsciu, ke ni bezonas helpon de ĉiuj por starigi la aŭtunan programon, tian, kia plaĉus al ĉiuj. Mi kredas, ke neniu estas inter ni, kiu per sia ekstaro antaŭ la klubanaro kaj almenaŭ eta kontribuo ne povus plivariigi niajn klubajn vesperojn. Aliĝu ĉe s-ano Kynčl, kiu devas konsistigi la aŭtunan planon!

Sed, kaj ankaŭ tre grave: ni devas prepari nin por eksterkluba aktiveco. Unu el la formoj de tiu aktiveco estos, al ni postulota, aktiva kunlaboro al la fondotaj Interkluboj, en la kadro de junulara asocio SSM. Komisiitoj de ĈEA jam traktas kun SSM en tiu rilato. Kaj aliaj formoj de publika aktiveco aperos antaŭ ni.

J.Mařík

V souvislosti s výše uvedenou výzvou sam. Maříka prosí redakce všechny členy, aby podle svých možností přispěli ke zpestření klubového programu a BULTENA.

Své příspěvky do programu můžete oznámit vždy během klubového večera sam. Kynčlovi.

Příspěvky do našeho věstníku (informace, postřehy, fejetony, básně a pod.) předejte některému z členů redakce.

P o k l a d n í  z p r á v u vkládáme do dnešního čísla zároveň se složenkami těm členům, kteří dosud nezaplatili členské příspěvky na rok 1975. Inkaso těchto příspěvků jsme již zahájili.

V 1. čísle našeho klubovního věstníku jsme uveřejnili došlé d a r y na klubovou činnost a BULTENO, dnes uvádíme další:

| | |
|---|---|
| 148,- Kčs | B. Řeháčková, Praha |
| 100,- Kčs | prof.Th. Kilián, Třebíč |
| 50,- Kčs | Ota Jerie, Praha, Božena Korbelová, Písek |
| 32,- Kčs | Věra Skálová, Praha |
| 30,- Kčs | Fr. Bárta, Žilina, Jan Tichon, Bojkovice, J. Tomíšek, Říkovice, Jiří Laube, Roudnice, EK Havlíčkův Brod, |
| 25,- Kčs | Em. Chmelařová, Přerov, |
| 20,- Kčs | Old. Müllerová, Šumperk, Roman Michna, Lichnov, Vl. Hasala, Mutěnice, J.V. Otta, Raškov, Míst. skup. ČES Kyjov, Klub pracujících n.p. JITEX Písek, Informilo de E. K. Žilina, Esperanto-Rondeto Plzeň, |
| 12,- Kčs | Marta Křenková, Praha, Lib. Kouřilová, Praha, Esp. kroužek Vyškov, manželé Šperlingovi, Praha, |
| 15,- Kčs | Jedn. klub pracujících ROH, Polička |
| 10,- Kčs | M.Vacovská, K.Šiková, Dolfa Bartošík, všichni z Prahy, |

K. Kraft, ObořiŠtě, M. Fejfar, Dymokury, L. Klegová, Ostrava, E. V. Tvarošek, Trenčín, Vl Kováč, Žilina, Místní ČES v Ostravě, Ing.V. Jandík, Cheb, Fr. Straňánek, Paskov,

| | |
|---|---|
| 9,- Kčs | Kr. Vlčková, Praha, |
| 6,- Kčs | A. Godková, B. Dryák, R. Sadílková, St. Žirovnická všichni z Prahy, K. Grund, Klánovice |
| 5,- Kčs | M. Benešová, Praha, |
| 4,- Kčs | K. Vitičová, Praha |

A.Bárochová
pokladní EKP

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

N I A J F O R P A S I N T O J :
čl. JUDr. Miloslav Š a n t r o c h , Praha (17.9.1973)
čl. Josef P e t r l í k , Praha (4.7.1974)
příznivkyně Milada V y b u l k o v á , Hradec Králové (24.9.1974)

O Z N Á M E N Í

V průběhu měsíce října se zahajují další dva běhy kursů esperanta, pro začátečníky a pokročilé, a to:
14.10.1974 - ČKD Praha-Kompresory (vede dr. Miloš Nývlt)
15.10.1974 - ROH-Nádraží ČSD Praha-Smíchov (vede Antonín Slanina)
Kromě toho se v souvislosti s navázanou spoluprací se ZV-ROH NVP připravuje při tamější skupině SSM zahájení začátečnického kursu, k němuž dojde koncem října nebo začátkem listopadu.

Vigla junularo en Liberec

Seminarion de esperantista junularo en Černá Louže la 22-an de septembro partoprenis 43 personoj. La seminarion malfermis s-ano Ladislav Špína kaj transdonis la vorton al s-ano Josef Vítek, prezidanto de ĈEA, kiu parolis pri la organizado de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio.

S-ano Špína prelegis poste pri historio de Esperanto kaj s-ano Antonín Slanina prezentis enkondukan lecionon de Esperanto laŭ nova metodo Inter. S-ano Josef Vítek jun. parolis pri problemoj de junularo. S-ino Eva Seemanová plenumis kulturan vesperon per klasika ĉeĥa poezio.

Duan tagon s-anoj Špína kaj Slanina prelegis pri praktika uzado de Esperanto dum vojaĝoj eksterlanden.

La seminario finiĝis per laborkunveno de gejunuloj.
Kun "ĝis revido" ni disiris en diversajn lokojn de la respubliko, ĉar la kunvenon partoprenis gesamideanoj de malproksima Ostrava, Olomouc, K. Vary k.t.p.

Ant.Slanina

A N E K D O T O J :
- En gazeto vi anoncis, ke vi vendos vian hundon. Ĉu ĝi estas sufiĉe "akra"?
- Sinjoro, tio dependos de vi, kiel vi ĝin kuir-pretigos!

-o-o-o-

Ŝi: Se mi nun saltus en la akvon, ĉu vi savus min?
Li: Kaj se mi diros jes, ĉu vi saltos?

-o-o-o-

- Sinjorino, ĉu vi subtenas vian edzon?
- Nur se li revenas el gastejo.

-o-o-o-

Demando estas ofte la patrino de l' mensogo.

---

BULTENO de EKP (loka grupo de ĈEA) pk 1069, Praha 1
redaktas: Dr-o Miloš Nývlt, Jaroslav Mařík, Václav Lorenz.